

La Sutro de la Budho de Nemezurebla Vivo

laŭ la ĉina versio de Saṃghavarman

佛說無量壽經

Esperanten trad. **Yamaguti Sin'iti**, Japanio

LA DUA VOLUMO

[certigo pri vervekiĝo en la pura lando]

La Budho diris al Ananda, “Tiuj viv-estaĵoj, kiuj naskiĝas en tiu budho-lando, ĉiuj eniras en la aron de kolegoj, kiuj estas desitnitaj al nepra vervekiĝo. Kial? Ĉar en tiu budho-lando ne troviĝas la aro de malvekiĝantoj nek la aro de ne-nepra vekigantoj. Ĉiuj budhoj-tatagatoj en landoj multegaj kiel sableroj de Gango en la dek direktoj laŭdas la neimageble majestan virton de la Budho de Nemezurebla Vivo.

Ĉiuj viv-estaĵoj, kiuj aŭdas lian nomon kaj sincere volas naskiĝi en lia lando kun ĝojo kaj konfido, eĉ se dum unu momento, sincere turnante sian koron al la budho, povas tuj naskiĝi tie kaj resti en la etapo de ne-regreso, escepte de la okazo, ke ili faris la kvin gravajn pekojn aŭ perfidis la ĝustan darmon.”

[la tri specoj de praktikantoj]

La Budho diris al Ananda, “Inter la dioj kaj homoj en la dek direktoj de la universo, kiuj volas sincere naskiĝi en la budho-lando, estas la distingo de la tri tipoj.

Al la supera tipo apartenas tiuj, kiuj forlasas sian hejmon, forĵetas dezirojn, fariĝas bikŝuoj, ekhavas la koron cele al bodio, koncentras sian koron al la Budho de Nemezurebla Vivo, akumulas diversajn meritojn, kaj volas naskiĝi en la budho-lando. Kiam tiuj ĉi viv-estaĵoj estas finontaj sian vivon, aperas antaŭ ilin la Budho de Nemezurebla Vivo kune kun multaj sanktuloj. Tuj ili sekvante la Budhon venas al lia lando. Ili naskiĝas nature

kaj karmece¹ en la mezo de la floro el sep juveloj kaj restas en la etapo de ne-regreso. Ili estas saĝaj kaj kuraĝaj, disponante superhoman kapablon. Tial, vi Ananda, se iu volas vidi la Budhon de Nemezurebla Vivo en sia nuna vivdaŭro, tiu devas ekhavi la koron cele al la plej supera bodio, praktiki diversajn virtojn, kaj deziri naskiĝi en tiu budho-lando.”

La Budho diris al Ananda, “Inter la dioj kaj homoj en la dek direktoj de la universo, al la meza tipo apartenas tiuj, kiuj sincere volas naskiĝi en la budho-lando kaj tamen ne povas fariĝi bikŝuo por akumuli grandajn meritojn. Ili devas ekhavi la koron cele al bodio, kaj koncentri sian koron al la Budho de Nemezurebla Vivo; la bonan efikon el la jenaj agoj — praktiki iom bonajn agojn, observi purajn disciplinojn, kontribui por konstruado de stupaoj kaj de budhaj statuoj, regali bikŝuojn per manĝaĵoj, donaci baldakenojn kaj lampojn, disŝuti florojn, bruligi incensaĵojn — ili utiligas por naskiĝi en la budho-lando. Kiam ili estas finontaj sian vivon, aperas antaŭ ilin avatare la Budho de Nemezurebla Vivo, akompanate de multaj sanktuloj. La lumo kaj la detalaj aspektoj de la avatara Budho estas samaj kiel tiuj de la reala Budho. Poste ili sekvas la avataran Budhon, naskiĝas en la lando, kaj restas en la etapo de ne-regreso. Ili en merito kaj saĝo estas duaj post tiuj de la supera tipo.”

La Budho diris al Ananda, “Inter la dioj kaj homoj en la dek direktoj de la universo, al la suba tipo apartenas tiuj, kiuj sincere volas naskiĝi en la budho-lando kaj tamen ne povas praktiki diversajn meritojn. Ili devas ekhavi la koron cele al bodio, kaj koncentri sian koron al la Budho de Nemezurebla Vivo, eĉ se nur dek fojojn, por naskiĝi en la lando. Ili aŭdinte la profundan darmon ĝojas kun ĝojo kaj konfido, sen dubo, koncentras sian koron al la Budho, eĉ se dum unu momento. Kiam ili estas finontaj sian vivon, ili vidas la Budhon kvazaŭ en revo kaj plenumas sian naskiĝon en la lando. Ili en merito kaj saĝo estas duaj post tiuj de la meza tipo.”

[budhoj laŭdantaj Amitabon]

La Budho diris al Ananda, “La majesteco de la Budho de Nemezurebla Vivo estas eksterordinara. Sennombraj, senlimaj, neimageblaj budhoj-tatagatoj el la dek direktoj de la universo senescepte laŭdas Lin. Sennombraj bodisatvoj el la orientaj landoj tiom multaj kiom sableroj de la

¹ Laŭ la antikva budhismo, naskiĝo havas kvar tipojn: (1) naskiĝo el ovo (2) naskiĝo el utero (3) naskiĝo el humido, ekzemple etaj insektoj. (Tiutempe, oni ne povis observi, ke ankaŭ insektoj naskiĝas el ovo.) (4) naskiĝo el antaŭa karmo, t.e. sen naturscienca kaŭzo sed kun super-sciencaj kaŭzoj; ekz. dioj aŭ demonoj apartenas al tiu ĉi grupo.

rivero Gango venas al la Budho de Nemezurebla Vivo por montri respekton kaj fari adoron ne nur al Li sed ankaŭ al tieaj bodisatvoj kaj disĉiploj. Kaj ili aŭskultinte la predikon de la Budho disvastiĝas ĝin al siaj kolegoj. La samon faras ankaŭ bodisatvoj el la sudaj, okcidentaj, nordaj, nord-orientaj, sud-orientaj, nord-okcidentaj, sud-okcidentaj, supraj, kaj subaj landoj.”

Tiam la Bagavato faris jenajn versojn:

[himno por laŭdi Amitabon]

“Oriente troviĝas tiom multaj budho-landoj
kiom sableroj de la rivero Gango.
Tieaj bodisatvoj vizitas Budhon de
Nemezurebla Vivo por respekti Lin.
Sude, okcidente, norde, plie kvar-angule,
supre, sube, ankaŭ tiel same;
Tieaj bodisatvoj vizitas Budhon de
Nemezurebla Vivo por respekti Lin.
Ĉiu Bodisatvo respektive alportas florojn,
kiuj floras en ĉiela regno,
juvelojn, incensaĵojn, kaj superajn vestaĵojn
al Budho de Nemezurebla Vivo.
Ĉiuj kune ludas ĉielan muzikon,
eligas harmonian kaj elegantan sonon,
por kante laŭdi la plej respektindan
Budhon de Nemezurebla Vivo jene:
‘Vi atingis ĝisfunde superhoman saĝon,
eniris en pordon de profunda darmo,
ekhavis trezorejon plenan de meritoj;
via mirinda saĝo estas senegala.
Vi per saĝo lumigas mondon
kaj forpelas nubon de naskiĝo-kaj-morto.’
Ili ĉirkaŭiras Lin tri fojojn
respekte riverencante kun kapo surtere.
Eksciinte, ke Lia pura lando
estas neimageble solena kaj superba,
bodisatvoj ekhavas superan voton, ke
ankaŭ ilia lando estu tia.
Tiam Budho de Nemezurebla Vivo
ŝanĝetas mienon kaj ridetas afable,

eligante sennombrajn lumojn el sia buŝo
por lumigi universale ĉiudirektajn landojn.
Lumo ĉirkaŭiras Lin tri fojojn
kaj eniras en Lian kapon.
Ĉiuj dioj kaj aliaj estaĵoj
saltante dancante ĝojas pro tio.
Ordiginte robon kaj klininte kapon,
Avalokiteŝvaro demandas Budhon jene:
'Pro kia kondiĉo Vi ridetas?
Ho, bonvolu klarigi vian intencon!'
Pura voĉo posedanta ok karakterojn
sonas kiel tondro por diri:
'Mi promesu, ke vi bodisatvoj
future fariĝu budhoj. Bone aŭskultu!
Mi scias ĉiujn votojn de
bodisatvoj venintaj el dek direktoj.
Vi serĉadas solenan puran landon;
tial vi nepre fariĝos budho.
Kvankam vi vidas, ke ekzistaĵoj
estas kvazaŭ revo, iluzio, eĥo,
vi pleniginte votojn nepre starigos
landon saman kiel ĉi tiun.
Kvankam vi vidas, ke ekzistaĵoj
estas kvazaŭ fulmo aŭ ombro,
vi enkorpigos meritojn kiel bodisatvo;
tial vi nepre fariĝos budho.
Kvankam esenco de ekzistaĵoj estas
sen-enta kaj sen-atmana, vi serĉadas
puran landon kaj nepre starigos
landon saman kiel ĉi tiun.'
Diversaj budhoj rekomendas al bodisatvoj
en sia lando observi Amitabon:
'Aŭskultu, tenu, kaj praktiku darmon,
por atingi landon de Amitabo!
Kiam vi atingos tiun purlandon,
vi tuj gajnos superhoman forton;
Budho de Nemezurebla Vivo tie
garantios al vi superan vervekiĝon.

Pro forto de tiu Budho
aspiranto al tiu lando atingas
tiun landon, aŭdinte Lian Nomon,
neniam regresante de budha vojo.
Tie bodisatvoj ekhavas superan voton:
ankaŭ ilia lando estu tia;
ĉiuj ĉiaj estaĵoj estu savitaj
kaj iliaj nomoj estu konataj.
Ili alvenas al diversaj landoj
por servi al multegaj tatagatoj
kun profunda respekto kaj ĝojo
antaŭ ol reveni al Amitabo.
Se al iu mankas bona semo,
tiu ne povas ekscii instruon.
Tiu, kiu tenas puran disciplinon,
nun povas aŭskulti ĝustan darmon.
Iam vidinte bagavaton, oni fidas
votojn de Amitabo, ekzercas sin
respekteme kaj humile laŭ instruo,
kaj kvazaŭ saltete ĝojas elkore .
Oni, estante aroganta, perversa, pigra,
ne povas kredi tiun darmon.
Tiu, kiu en antaŭa vivo
vidis budhojn, ĝojas aŭskulti instruon.
Eĉ budhaj disĉiploj kaj bodisatvoj
ne povas plenscii budhan koron.
Denaska blindulo ne povas konduki
homojn sur vojo; tiel same;
Saĝo de tatagato estas tiel
vasta kaj profunda kiel oceano,
ke disĉiploj kaj bodisatvoj sondi
ne povas; budho sola scias.
Eĉ se iu atingas vojon
kaj puran saĝon sciantan, ke
ĉio estas sen-enta, kaj imagas
budhan saĝon dum longega tempo,
li ne povas plenscii tion,
post ĉiaj rimedoj kaj klopodoj,

ke budha saĝo estas senlima
kaj pura tiel kiel dirite.
Estas malfacile naskiĝi kiel homo,
des pli malfacilas renkonti budhon;
plej malfacilas gajni konfidan saĝon.
Kiam vi aŭdas darmon, strebu!
Aŭdinte darmon ne forgesu ĝin!
Koninte darmon respektu ĝin ĝoje!
Tiam vi estas mia amiko.
Ekhavu koron cele al bodio!
Eĉ se fajro plenigas mondon,
nepre transpasu ĝin serĉante darmon!
Vi devas plenumi budhan vojon
kaj savi viv-estaĵojn el naskiĝo-kaj-morto.”

[bodisatvoj en la pura lando]

La Budho diris al Ananda, “Ĉiuj bodisatvoj en tiu lando estas atingontaj la plej superan etapon, t.e. suplementan rangon de budhiĝo, escepte de la okazo, ke ili intencas resti en la rango de bodisatvo pro sia voto, ke ili liberigu ĉiujn viv-estaĵojn per la forto de siaj meritoj kaj virtoj, per kiu ili sin vestas. Ananda, disĉiploj en tiu lando havas tian korpon, kies lumo atingas unu klafton da distanco. Sed lumo de bodisatvoj atingas cent joĝanojn da distanco. Interalie du bodisatvoj estas la plej superaj, kaj ilia majesta lumo atingas ĝis la tuta universo el miliardoj da mondoj.”

Ananda diris al la Budho, “Kiel la du bodisatvoj nomiĝas?”

La Budho diris, “La unua nomiĝas Avalokiteŝvaro, kaj la alia Mahastamaprapto. Tiuj ĉi du bodisatvoj faris bodisatvan praktikon en tiu ĉi lando, kaj ili post la fino de sia vivo renaskiĝis nature kaj karmece en tiu budho-lando. Ananda, ĉiuj viv-estaĵoj naskitaj en tiu lando posedas la tridek du signojn². Same kiel Avalokiteŝvaro kaj Mahastamaprapto ili estas plenaj de saĝo, profunde konas la realon de diversaj ekzistaĵoj, atingis la esencon de instruoj, havas superhoman forton, estas senbaraj, kaj klaraj kaj akraj en siaj ses sens-organoj. Tiuj, kiuj estas ankoraŭ malkleraj, povas

² Tradicie, budho estas rigardata kiel speciala ekzisto, kiu havas tridek du korpajn karakterizaĵojn. La sutro “*Lakkhaṇa Sutta*” (*Digha Nikaya* vol.30) priskribas detale pri tiuj ĉi karakterizaĵoj; ekzemple, sur lia plando estas stampita la marko de rado el mil radioj.

atingi la du unuajn nivelojn de vervekiĝo³, kaj tiuj, kiuj estas kleraj, povas atingi la trian nivelon nehaveblan por ordinaruloj, t.e. vervekiĝon je la vero pri ne-estiĝo kaj ne-malestiĝo. Tiuj ĉi bodisatvoj ne regresas al malbonaj sferoj ĝis kiam ili budhiĝos, havas liberajn superhomajn fortojn, povas koni ĉiam ajn sian antaŭan vivon. La sola escepto estas por tiu, kiu pro sia propra voto volas naskiĝi kiel ordinarulo en la mondo de kvin specoj da degenero, same kiel mi mem.”

La Budho diris al Ananda, “Bodisatvoj en tiu lando, kun la helpo de la majesta forto de la Budho, vizitas sennombrajn mondojn en la dek direktoj de la universo kaj revenas dum tempo de ilia unufoja manĝado, farinte omaĝon kaj oferon al tieaj budhoj-tatagatoj. Flora aromo, bona muziko, baldakenoj, flagoj, kaj aliaj sennombraj ornamaĵoj por oferado aperas spontane laŭ ilia volo; ili estas fajnaj, raraj, kaj nevideblaj en tiu ĉi mondo. Kiam bodisatvoj donace disŝutas florojn al budhoj, bodisatvoj kaj disĉiploj, ili transformiĝas en la ĉielo en florbaldakenojn fajre brilantajn kaj ĉie ajn aromantajn. Kelkaj el la floroj havas la perimetron de kvar centoj da mejloj, kaj aliaj estas pli larĝaj, eĉ kovrantaj la universon de miliardoj da mondoj. Ili aperas kaj malaperas sinsekve laŭorde. Bodisatvoj banas sin en plezuro, ludas belan ĉielan muzikon kun delikataj tonoj, laŭdas budhajn virtojn per mirindaj kantovoĉoj, kaj ĝojas senlime aŭskultante instruojn. Post la oferado al la Budho ili tuj leĝere reiras al la lando de Amitabo antaŭ la tempo de manĝado.”

La Budho diris al Ananda, “Kiam la Budho de Nemezurebla Vivo eksplikas darmon al disĉiploj kaj bodisatvoj laŭgrade de iliaj kapabloj, ili ĉiuj kunvenas en la granda halo konstruitan el la sep juveloj, kaj kun ĝojo komprenas la detale klarigitan instruon pri la budha vojo. En tiu momento la vento blovas spontane de la kvar direktoj ĝis la juvelaj arboj, kiuj per tio eligas kvin tonojn kaj faligas sennombrajn mirindajn florojn. La vento senĉese alportas la florojn ĉien ajn, kio estas naturan oferon al la Budho. Ĉiuj dioj oferas siajn centojn, milojn da floroj, aromoj kaj muzikinstrumentoj al la Budho, diversaj disĉiploj kaj bodisatvoj. Ili iras tien kaj reen por disŝuti florojn kaj aromojn kaj ludi diversajn muzikojn, sed sen konfuziĝante inter si. Tiam atmosfera estas neesprimeble plezura kaj ĝoja.”

La Budho diris al Ananda, “La bodisatvoj, kiuj naskiĝis en tiu budho-

³ akcepti la budhan darmon kun mensa trankvilo; sekvi la budhan darmon kun mensa fleksio. (vd. piednoton 27 de la unua volumo)

lando, ĉiam eksplikas la ĝustan darmon al aŭskultantoj senmanke, neniam sen eraro, ĉiam sekvante la budhan saĝon. Ili tenas nenion en tiu budhlando al si, nek havas penson, ke io apartenas al ili. Irante, revenante, marŝante, haltante, ili estas liberaj de io ajn, ne katenitaj de pasio, ĉu por intimuloj, ĉu por neintimuloj. En ilia koro ne troviĝas la konscio pri 'mi' aŭ 'li/ŝi'. Tial ili neniam konkurencas aŭ kverelas kun la aliaj. Ili fronte al ĉiuj viv-estaĵoj sentas grandan kompaton, kaj volas doni al ili profitojn. Ili estas ĉiam milde fleksiaj, malhavante koleron kaj venĝemon, tenante puran koron liberan de pasioj kovrantaj la veron, ne estante pigraj aŭ enuaj. Ili havas nenion alian ol la koron, kiu estas egala al ĉiu, decida je volonteco, profunda, konstanta, amanta la darmon, ĝojanta pri la darmo, kaj kontenta pri la darmo. Ili forigis diversajn pasion kaj emon, kiu facile kondukas al malbonaj sferoj.

La bodisatvoj elpraktikis ĉiujn agojn necesajn por esti bodisatvo, plenumis sennombrajn virtojn sur si, gajnis diversajn fortojn de saĝo kun profunda meditado, ekzercis sin en la sep praktikoj⁴ por bodiiĝo, kaj volas budhan darmon. Ilia fizika okulo estas klare vidanta la realan mondon; ilia dia okulo penetras ĉien ajn senlime; ilia darma okulo observas diversajn vojojn ĝis la fino; ilia saĝa okulo vidas la veron por transiri al la bordo de bodio; ilia budha okulo vervekiĝas je la esenca karaktero de ekzistaĵoj. Ili predikas por viv-estaĵoj per senbara saĝo, klare vidas, ke ĉio en la tri sferoj estas sen-enta kaj nenio efektive ekzistas, serĉas budhan darmon, kaj diversmaniere elokventante eliminis ĉagrenojn pro kleŝoj de viv-estaĵoj. Ĉar ili venis el la mondo de tieleco⁵, ili plene komprenas la verajn aspektojn de ekzistaĵoj. Ili konas lertajn rimedojn por igi viv-estaĵojn lerni bonojn kaj forigi malbonojn, ne deziras retorikon en la sekulara mondo, kaj ĝojas ĝustan logikon.

La bodisatvoj akumulas diversajn meritojn pro bonaj agoj kaj respektas budhan vojon. Ĉar ili bone scias, ke al ĉiuj ekzistaĵoj vere mankas esencaĵo, al ili jam ne restas potenciala efiko pro kleŝoj en menso kaj pro suferoj en korpo. Ili aŭskultas la profundan darmon, tial ili povas ekzerci

⁴ 1) memori kaj ne forgesi instruojn. 2) distingi veraĵon disde falsaĵon per forto de saĝo. 3) strebadi senĉese. 4) ĝoji pro instruoj 5) flekseble kaj leĝere teni korpon kaj menson 6) koncentri sian atenton 7) esti trankvila sen ekscitiĝo kaj sen pigreco

⁵ sanskrite *tathātā*; palie *tathatā*. La vereco, laŭ kiu oni rigardas kaj observas aĵojn sen ajna antaŭjuĝo aŭ intereso, tute tiel, kiel ili efektive estas. "Tatagato", alinomo de budho, signifas "veninto el *tathātā*" (ĉine 如来) aŭ "irinto al *tathātā*" (ĉine 如去).

sin senhezite kaj sendubeme. Ilia granda kompato, estante profunda, mirinda, kaj egala, kovras ĉiujn senescepte. Ili elstudis la mahajanan instruon, transirigas viv-estaĵojn al la bordo de bodio, kaj fortranĉis la reton de dubo. Saĝo ekestas ĉe ilia menso. Ili konas la budhan darmon senmanke. Ilia saĝo estas vasta kaj profunda kiel maro; ilia koncentrado estas stabila kiel la monto Sumeru. La lumo el ilia saĝo klara kaj pura superas tiun el la suno kaj la luno. Ili havas pure blankajn virtojn kaj meritojn perfekte sur si.

La bodisatvoj similas al monto kovrita de neĝo, ĉar ili montras virtojn en la sama grado de pureco. Ili similas al la tero, ĉar en ilia koro ne troviĝas la distingo inter puro kaj malpuro, inter bono kaj malbono. Ili similas al pura akvo, ĉar ili forlavas diversajn malpuraĵojn kaŭzitaĵojn de kleŝoj. Ili similas al la reĝo de fajro, ĉar ili forbruligas hejtlignojn de kleŝoj. Ili similas al ventego, ĉar ili movas sin senbare tra diversaj mondoj. Ili similas al malplena spaco, ĉar ili alkroĉiĝas al neniu ekzistaĵo. Ili similas al lotusa floro, ĉar ili ne malpuriĝas estante en sekularaj mondoj. Ili similas al granda vehiklo aŭ veturilo⁶, ĉar ili elkondukas amason da viv-estaĵoj el la sfero de naskiĝo-kaj-morto. Ili similas al peza tondronubo, ĉar ili faras la tondregon de darmo por vekti tiujn, kiuj ankoraŭ ne vekigiĝis. Ili similas al pluvnubo, ĉar ili faligas nektaran pluvon de darmo por mildigi soifon de viv-estaĵoj. Ili similas al diamanta monto, ĉar ili ne estas moveblaj de aro da maraĵoj aŭ de nekredantoj. Ili similas al Braĥmo, ĉar ili okupas la plej altan lokon en la kampo de bonaj agoj. Ili similas al bengala bodiarbo⁷, ĉar ili protektas ĉiujn viv-estaĵojn. Ili similas al udumbara floro, ĉar oni malofte renkontas ilin. Ili similas al garudo⁸ kun oraj flugiloj, ĉar ili konkeras herezulojn per sia majesta forto. Ili similas al migrobirdo, ĉar al ili ne troviĝas posedaĵo nek ŝparaĵo. Ili similas al la reĝo de bovo, ĉar neniu

⁶ “Mahajano” signifas grandan veturilon aŭ grandan vehiklon, angle *great vehicle*. Ĉi tie la originala teksto uzas la vorton 大乘; tiu ĉi termino estas ofte tradukita kiel “mahajano”, sed en tiu ĉi kunteksto temas ne pri skolo aŭ movado (mahajana budhismo) sed pri veturilo mem en laŭlitera senco.

⁷ Scienca nomo estas *Ficus benghalensis*, angle *banyan tree*. Ĝia branĉaro etendiĝas larĝe kaj faras grandan ombron. Tiel nomata bodiarbo estas simbolo de budha vervekiĝo, dum tiu ĉi arbo estas ofte rigardata kiel simbolo de bodisatva agado por savi viv-estaĵojn.

⁸ Garudo estas mita besto, homaĝo de Hindujo, nun konata en Birmo, Vjetnamujo, Laoso, Kamboĝo, Tajlando, Indonezio kaj Malajzio. Ĝi havas aglajn kapon, flugilojn, ungojn, bekon kun viraj trunko kaj membroj. (el Vikipedio)

povas venki ĝin. Ili similas al la reĝo de elefanto, ĉar ili estas ĝentilaj kaj malsovaĝaj. Ili similas al la reĝo de leono, ĉar ili timas nenion kaj neniun. Ili estas vastaj, simile al malplena spaco, ĉar ilia granda kompatato ampleksas ĉiujn viv-estaĵojn.

La bodisatvoj neniigis avidemon, ĉar ili ne envias tiujn, kiuj estas pli superaj ol ili. Ili trovas ĝojon ekskluzive en serĉado de darmo sen enuo. Ili estas ĉiam fervoraj en vasta predikado kaj neniam hezitemaj. Ili batas la tamburon de darmo, hisas la flagon de darmo, lumigas la sunon de saĝo, kaj forpelas la mallumon de iluzio. Ili kultivas respektadon inter si laŭ la ses manieroj⁹ kaj ĉiam praktikas la prezentadon de darmo. Ilia volo estas firma kaj neniam regresas. Ili fariĝas la lampo lumiganta la mondon kaj la plej bona kampo, en kiu oni akumulas meritojn. Ili fariĝas la gvidanto por viv-estaĵoj, tute egale al amikoj aŭ malamikoj. Ili nur deziras la ĝustan vojon, neniam ĝuante mondajn plezurojn nek sentante malĝojon. Paŝi la ĝustan vojon sola estas ilia intenco, kaj nenio alia ĝojigas nek ĉagrenas lin. Ili eltiris el si dornon de deziro, kaj ili alportas trankvilon al viv-estaĵoj. Ilia merito kaj saĝo estas tiel eminenta, ke ĉiu ajn respektas ilin.

La bodisatvoj malmuntis la obstaklon el la tri specoj de malpuraĵoj¹⁰, kaj manipulas libere diversajn superhomajn kapablojn. Ili posedas jenajn fortojn senmanke: la forton de la pasintaj bonaj karmoj, la forton kreskigi bonajn karmojn, la forton de decido, la forton de voto, la forton de lerta rimedo, la forton de konstanta praktiko, la forton de bona ago, la forton de meditado, la forton de saĝo, la forton de atentema lernado, la forton de donacado, de morala vivo, de pacienco, de strebado, de koncentrado, de perfekta saĝo, de ĝusta koncentrado, kaj de ĝusta observado, la forton de rezonado, la forton trejni viv-estaĵojn al la direkto de la ĝusta darmo, kaj tiel plu.

La bodisatvoj estas ornamitaj de korpa koloro, aspekto kaj figuro, meritoj, kaj elekventeco, kiuj estas perfektaj. Ili respektas kaj kultas sennombrajn budhojn, pro kio ili estas konstante laŭdataj de ĉiuj budhoj. Ili plenumis diversajn paramitojn necesajn por bodisatvoj, gajnis la profundan koncentradon, en kiu oni ekkonas sen-enton, sen-aspekton, sen-aspiron, ne-estiĝon, ne-malestiĝon, kaj tiel plu, kiuj transcendas la staton de disĉipla budho kaj de privata budho. Sciu, Ananda, ili jam plenumis ĉi tiajn sennombrajn meritojn. Mi klarigas ĉi tion al vi nur koncize. Se mi precize

⁹ (1) korpo (2) paro (3) koro (4) precepto (5) donaco (6) opinio

¹⁰ avidemo, kolero, kaj malvido (aŭ stulteco). Sama al la tri venenoj.

klarigus, eĉ centoj, miloj da kalpoj ne sufiĉus.”

[konsilo de Ŝakjamunio]

La Budho diris al la bodisatvo Majtrejo kaj al dioj kaj homoj en la kolektiĝo, “La merito kaj saĝo de la disĉiploj kaj bodisatvoj en la lando de la Budho de Nemezurebla Vivo ne povas esti plene klarigebla. Kaj Lia lando estas ĉi tiel mirinda, paca, ĝojiga, kaj pura. Mi konsilas al vi, ke vi strebu praktiki bonon kaj estu atentemaj pri la vojo, kiu nature kondukas al budheco senlima sendistinge ĉu supra, ĉu suba, kaj sur kiu vi devas paŝi per via propra strebado. Tiam vi nepre povas transcendi tiun ĉi mondon de iluzio, naskiĝi en la lando de paco, forviŝinte unufojon la kvin malbonajn sferojn¹¹, kies pordoj spontane fermiĝas, kaj supreniri al la ekstrema supro de la budha vojo. Kvankam la lando estas facile alirebla, en realo tre malofte da homoj naskiĝas tie. Sed la lando, en kiu nenio fartas senorde kaj nenio obstaklas, sendube pretas akcepti laŭnature ĉiujn laŭ la voto de la Budho. Tial mi konsilas, ke vi forĵetu sekularajn aferojn kaj vin direktu al serĉado de virtoj laŭ budha darmo. Tiamaniere vi povos gajni la plej longan vivon, kaj via feliĉo daŭros senfine.”

[la tri venenoj - avidemo]

“Malgraŭ tio homoj de tiu ĉi mondo, estante malsaĝaj kaj stultaj, kverelas unu kontraŭ la aliaj pri malgravaj aferoj. Ili vivas en la mezo de terura malbono kaj ekstrema suferado, kaj uzas sian korpon por vivteni sin en malpuraj aferoj. Ĉu altrangaj aŭ malaltrangaj, ĉu riĉaj aŭ malriĉaj, ĉu junaj aŭ maljunaj, ĉu viraj aŭ virinaj, ili ĉiuj zorgas pri sia mono kaj havaĵo; ilia ĉagreno ne diferencas, ĉu ili posedas, ĉu ne posedas. Ili estas ĉiam maltrakvilaj kaj iritataj, akumulas siajn zorgojn pri pasinteco kaj futuro, kuras tien kaj alien, kaj neniam havas trankvilan senton.

Kiam ili posedas kampon, ili zorgas pri sia kampo; kiam ili posedas domon, ili zorgas pri sia domo; bovo, ĉevalo kaj aliaj dombestoj, servisto, servutulo, mono, vestaĵo, manĝaĵo, ekipaĵo kaj tiel plu ankaŭ faras ilian zorgon. Ili amasigas zorgojn sur zorgojn, suspirojn sur suspirojn, kaj vivas en konstanta timo kaj tristo. Se neatendite ilia havaĵo estas rabita aŭ neniigita de hazarda kazo, kiel ekzemple inundo, incendio, ŝtelisto, malamiko, kaj kreditoro, ili sinkas en melankolion kun disŝirita koro, kiu

¹¹ narako, malsatulujo, bestujo, homujo, kaj ĉielo (aŭ diujo). Ili kune faras la mondon de iluzio.

neniam solviĝas. Ili ekhavas koleron en la sino kaj restas en ĉagreno kaj maltrankvilo. Ilia persistemo estas firme fiksita, tute ne delasita. Povas okazi iam ajn, ke katastrofo detruas ilian korpon, kaj tiam ilia vivo ja finiĝas vane forlasita, ĉar neniu volas sekvi ilin. Ankaŭ nobluloj kaj riĉuloj ne povas eskapi el tiu ĉi suferado. Ĉagrenoj kaj timoj estas tre diversaj. Ili nur suferas kaj maltrankvilas kun doloriga sento, kiu donas foje febron, foje malvarmon al ilia korpo.

Aliflanke malriĉuloj kaj malaltrangoj ĉiam suferas pro manko de aĵoj. Ĉar al ili mankas kampo, ili deziregas kampon kun maltrankvilo; ĉar al ili mankas domo, ili deziregas domon kun maltrankvilo; ĉar al ili mankas bovo, ĉevalo kaj aliaj dombestoj, servisto, servutulo, mono, vestaĵo, manĝaĵo, ekipaĵoj kaj tiel plu, ili deziregas ilin kun maltrankvilo. Eĉ se ili posedas ion, aliaj mankas. Ili deziras ĉion egale, kaj eĉ se ili akiras ĉiujn deziritaĵojn, tiuj tuj malaperas. Tiel ĉi ili afliktiĝas kaj suferas, kio igas ilin denove serĉi posedaĵojn, sed nur vane. Ili fariĝas lacaj je siaj menso kaj korpo, sidiĝas kaj stariĝas ne facile, kaj tiamaniere akumulas melankoliajn sentojn kun doloriga sento, kiu donas foje febron, foje malvarmon al ilia korpo. Tio foje eĉ mallongigas ilian vivon. Ĉar ili ne praktikis bonajn agojn nek ekzercis sin en akumulado de virtoj, post la fino de sia vivo ili foriras solaj al malproksima loko. Ili estas destinitaj al sia postmorta loko. Ili ne scias la leĝon pri kaŭzo kaj rezulto: bona kaŭzo naskas bonan rezulton kaj malbona kaŭzo naskas malbonan rezulton.”

[la tri venenoj - kolero]

“Homoj en la mondo devas ami kaj respekti unu la aliajn reciproke, neniam malamante nek enviante, inter patro kaj filo, inter edzo kaj edzino, inter familianoj, kaj inter parencoj. Kunhavu necesaĵojn senavare kun mildaj parolo kaj mieno. Ne ofendu nek damaĝi unu la aliajn. Se konfliktemo okazas aŭ kolero aperas en koro, kiom ajn ĝi nun ŝajnas bagatela, ĝi iom post iom grandiĝas en pliposta tempo kaj finfine fariĝas granda venĝemo. Kial? Ĉar rezulto de agoj, kiujn iu faras kontraŭ aliaj, revenas venĝe kontraŭ tiu mem. Se tio okazas ne tuj, kolero enhavante venenon akumuliĝas en koro, kaj rankoro estas stampita sur spirito neforigeble. Tiel unu kontraŭ la alia venĝadas ankaŭ en la posta vivo.

En la mondo de avido, homoj naskiĝas solaj, mortas solaj, iras solaj, venas solaj. Sekve de sia ago oni ricevas suferoplenan vivon aŭ feliĉan vivon. Oni mem ricevas konsekvencon. Neniu povas anstataŭi alian. Tiuj, kiuj faris bonajn agojn, renaskiĝas en feliĉa mondo, kaj tiuj, kiuj faris

malbonajn agojn, renaskiĝas en malfeliĉa mondo. Tiel strikta leĝo pri kaŭzo kaj rezulto decidas estontecon. Homoj iras al sia destinita loko, tial eĉ amikoj aŭ parencoj ne povas revidi ilin, se ili renaskiĝas alimonde. Bona ago kaj malbona ago decidas ilian renaskiĝon. Destinita loko estas tiel distanca, ke oni ne povas travidi la vojon al ĝi. Ili paŝas sur aliaj vojoj, neniam denove renkontiĝonte; revidiĝo ne eblas.

Kial vi ne forlasas malgravajn aferojn? Kiam vi estas forta kaj sana, vi devas strebi al bonaj agoj, intenci transcendi tiun ĉi mondon, kaj per tio gajni la vivon de ekstreme longa daŭro, nome la vivon de nirvano. Serĉu la budhan vojon! Kion vi atendas? Kian ĝojon vi deziras en tiu ĉi mondo?"

[la tri venenoj - malvido]

"Homoj en tiu ĉi mondo ne kredas, ke bonaj agoj rezultigas bonon, kaj praktikado de la budha vojo rezultigas gajnon de la budha vojo, nek ke homoj daŭrigas vivon post sia morto, nek ke donaco rezultigas feliĉon. Ili ne kredas la leĝon pri bono kaj malbono, neas ĝin, ne aprobas ĝin. Ĉar ili ne kredas ĝin, ili enfalas en malĝustan vidmanieron, kiu infektiĝas de homo al homo, daŭras de generacio al generacio, ĉar idoj lernas kaj heredas de sia patro lian instrukcion. Jam patroj kaj prapatroj ne faris bonajn agojn, ne konis moralon, estis stultaj je sia korpo kaj menso, persiste fermadis sian koron, kaj ne povis vidi, kien kondukas naskiĝo-kaj-morto, nek povis distingi bonan vojon disde malbona vojo. Neniu instruis al ili tion. Kia ajn feliĉo aŭ malfeliĉo okazas al ili, ili mem faris senkonscie la kaŭzon. Neniu rezonas pri la kaŭzo kaj kondiĉo. En tiu ĉi mondo naskiĝo kaj morto¹² ripetiĝas konstante, senhalte, kaj senĉese. Foje patro vekrias pro morto de sia ido, foje ido vekrias pro morto de sia patro; foje gefratoj, foje geedzoj vekrias reciproke. Ne nepras, ke maljunulo mortas antaŭ ol junulo; jen tio ĉi montras malkonstantecon de fenomenoj. Ĉio pasas kaj forfluas, ne haltigeblas. Eĉ se vortoj instruantaj tion ĉi por gvidi ilin troviĝas, malmultaj kredas ilin. Tial naskiĝo-kaj-morto sekvas ilin kaj daŭras senhalte.

Homoj ĉi tiel stultaj kontraŭas rezonon kaj ne kredas la darmon de sutroj, ne konsideras sian futuron, nur postkuras efemerajn plezurojn. Ili kaptite de volupto kaj avido perdis racion, ne gardas moralon, sinkas en ŝlimon de kolero, nur avidas profiton kaj amoron. Pro tio ili ne atingas la

¹² ĉi tie la tradukinte intence uzis la du vortojn "naskiĝo" kaj "morto" aparte, sen intermeti streketon. Dum "naskiĝo-kaj-morto" (生死) estas sinonimo de "iluzio", en tiu ĉi kunteksto la du vortoj estas uzataj laŭlitere. (vd. piednoton 20 de la unua volumo)

ĝustan vojon, revenas denove al malbona sfero, daŭrigas naskiĝo-kaj-morton. Vere kompatinde! Domaĝe!

Foje en unu familio iu mortas kaj alia restas, ĉu patro aŭ ido, ĉu frato aŭ fratino, ĉu edzo aŭ edzino. Ili malĝojas kaj afliktiĝas pro la adiaŭo, pensas pri la antaŭa intima rilato, ligiĝas al melankolio, vivas en veado, kaj dolorigas sian koron. Tagoj flugas kaj jaroj pasas, sed tio ne solvas ilian malĝojon. Vortoj instruantaj virtojn de la vojo ne malfermas ilian koron. Ili daŭre pensadas pri amo kaj favoro de forpasintoj, restante en karmemoro pri ili.

Ilia koro estas fermita mallumo, kaj kovrita de stulta konfuzo. Ili ne kapablas fari profundan konsideradon, detalan planadon, disciplinan konduton memvolan, strebadon por paŝi sur la ĝusta vojo forlasante vulgaraĵn bagatelojn, kaj finas sian vivon post migrado kaj rondiro. Ilia vivo tiel finiĝas vane, ne atinginte la vojon. Ĉio en tiu ĉi mondo estas malpura, embarasa, kaj senorda; ĉiuj estas plenaj de deziroj kaj ampasioj. Multaj homoj ŝanceliĝas antaŭ la vojo; nur malmultaj konscias pri ĝi. Ĉio en tiu ĉi mondo tro haste pasas kaj estas nefidinda. Ĉu noblaj aŭ malnoblaj, ĉu altrangaj aŭ malaltrangaj, ĉu riĉaj aŭ malriĉaj, ili ĉiuj estas okupitaj de vulgaraĵa aferoj. Ili entenas venenon de kolero kaj kaŝas malicon en si. Tial ili ofte faras krimojn, kontraŭante la naturan leĝon de la universo, kaj devojiĝante de la homa moralo.

Tiuj ĉi homoj estas akumulintaj malbonajn agojn, kiuj per si mem nature faras kondiĉojn por ke ili ripetu pekojn ĝis ekstreme. Pro tio al ili estas subite rabita ilia vivo, antaŭ ol finiĝas ilia destinita vivdaŭro. Ili enfalas en malbonan sferon kaj suferadas pro ripetata naskiĝo-kaj-morto. Ili migradas en malbonaj sferoj dum miliardoj da kalpoj, neniam trovante ŝancon por eskapi. Ilia doloro ne estas esprimebla. Vere kompatinde!"

[konsilo de Ŝakjamunio denove]

La Budho diris al la bodisatvo Majtrejo kaj al dioj kaj homoj en la kolektiĝo, "Mi ĵus rakontis al vi, kiel homoj vivas en tiu ĉi mondo. Ĉar ilia konduto estas ĉi tiel, ili ne povas atingi la vojon. Bone konsideru kaj pensu tion ĉi, kaj forlasu ĉiujn malbonaĵojn por eterne! Elektu bonaĵojn kaj praktiku ilin fervore! Sensa plezuro kaj prospero ne daŭras eterne. Ĉio devas esti forlasita. Nenio en tiu ĉi mondo donas al vi veran ĝojon. Ĉar vi nun vivas en la tempo, en kiu Budho vivas, ne ŝparu klopodojn. Tiuj, kiuj sincere aspiras naskiĝi en la lando de paco kaj feliĉo, gajnos klaran saĝon kaj mirindan meriton. Ne sekvu la inklinon de via propra koro, dum la

inklino kontraŭas instruojn aŭ preceptojn, por ke vi ne estu mokata de aliaj homoj. Se vi havas iajn dubojn, aŭ se vi ne komprenas ion en mia instruo, demandu min, budhon. Mi klarigu ilin por vi.”

[kompreno de Majtrejo]

Majtrejo genuiĝis adore kaj diris al la Budho, “Tio, kion la Budho majesta kaj respektata klarigis, ĝojigas min. Dum mi aŭskultadis la lecionon de la Budho, Liaj vortoj penetras mian koron, kaj mi atente konsideris ilin kaj komprenis: homaj estaĵoj en tiu ĉi mondo estas vere tiaj, kiel la Budho diris. Nun la Budho, en sia kompato, montras la grandan vojon. Niaj oreloj kaj okuloj estas malfermitaj al la lumo; finfine ni atingos liberiĝon. Ĉiuj, kiuj aŭskultas la parolon de la Budho, ĝojas senescepte.

Dioj, homoj, kaj eĉ vermoj aŭ tiaspecaj estaĵoj, ĉiuj liberiĝas de pasioj kaj suferoj, dank’ al Li. La instruoj kaj admonoj de la Budho estas tre profundaj kaj tre bonaj. Lia saĝo klara atingas ĉien ajn en la ok direktojn, supren, malsupren, ĝis ekstreman de la universo, travidante estintecon, estantecon, kaj estontecon. Nun ni estaĵoj estis liberigitaj dank’ al la Budho, ĉar Li en la antaŭa vivo humile kaj strebe serĉis la vojon. Lia graco kaj virto alte elstaranta kovras ĉiujn viv-estaĵojn. Lia lumo brilas, penetrante senfine la vastan ekspansion de la spaco. Ĝi malfermas la pordon al nirvano, igas nin lerni la esencon de la sutroj kaj konkeri eksterajn falsajn opiniojn, kaj emocias ĉiujn senreste kaj senfine.

La Budho estas la reĝo de darmo; Lia nobleco superas tiun de ordinaraj sanktuloj. Ĉie ajn li gvidas diojn kaj homojn, por ke ili atingu la vojon laŭ sia dispozicio. Hodiaŭ ni sukcese renkontis la Budhon kaj ankaŭ aŭdis la voĉon de la Budho de Nemezurebla Vivo, pro kio ni ĉiuj ĝojegas. Nia koro estas malfermita.”

[Ŝakjamunio aprobanta Majtrejon]

La Budho diris al la bodisatvo Majtrejo, “Tio, kion vi diris, estas prava. Se oni respektas budhon, oni gajnas grandan bonon. Multege da tempo pasas, antaŭ ol alia budho aperas en la mondo. Nun mi fariĝis budho en tiu ĉi mondo, montris la instruojn de darmo tiel, ke mi disvastigis la instruojn pri la vojo, tranĉis la reton de duboj, elradikigis volupton kaj avidon, kaj fermis la fonton de ĉiuj malbonoj. Mi vojaĝas por predikado en la tri sferoj senbare. La budha saĝo, kiu montriĝas en la sanktaj skriboj, estas la esenco de multaj vojoj al vervekiĝo. La instruoj tenas firme la

racion, iluminas ĉiun klare, montras la kvin sferojn¹³, liberigas tiujn, kiuj ankoraŭ ne liberiĝis, kaj distingas la vojoj al naskiĝo-kaj-morto disde tiu al nirvano

Majtrejo, vi sciuj: vi ekzercadis vin en la bodisatvaj praktikoj dum sennombraj kalpoj por savi viv-estaĵojn, el kiuj nemezureble multaj sekvinte vin paŝis sur la vojo kaj atingis nirvanon. Vi, kun dioj kaj homoj en la dek direktoj de la universo, ankaŭ kun anoj apartenantaj al la kvar komunumoj de la samgo¹⁴, dum multege da kalpoj, turniĝadis en la kvin sferoj, suferante pro maltrankvilo, timo, laborego kaj doloro, kaj tiel plu, kiuj ne estas esprimeblaj. Ĝis nun tiu ĉi cirklo de naskiĝo-kaj-morto ne ĉesis. Sed nun vi renkontis la Budhon vid-al-vid, aŭskultis la instruojn, kaj aŭdis pri la Budho de Nemezurebla Vivo. Bonege kaj mirinde! Nun mi helpu vin kaj alportu al vi ĝojon.

Nun vi mem fuĝu de la doloriga sufero de naskiĝo, morto, kadukiĝo, kaj malsaiĝo. Tiu ĉi procezo estas plena de abomenaĵoj kaj malpuraĵoj, kaj neniel ĝuinda. Vi mem decideme rektigu vian korpon, ĝustigu vian konduton, praktiku plu diversajn bonojn, regu vian koron, purigu vian korpon, forigu malpuraĵojn de via koro, estu sincera kaj ne falsa je via parolo kaj praktiko, je via ekstero kaj interno. Vi devas helpi unu la aliajn por savi vin, serĉi fervore la vojon, kaj akumuli la radikojn de bono.

Eĉ se vi strebas al tiuj ĉi praktikoj dum la tuta vivdaŭro, tio estas nur momenta [se kompari tion kun la preskaŭ eterna daŭro de naskiĝo-kaj-morto]. Poste vi naskiĝos en la lando de la Budho de Nemezurebla Vivo, kie vi ĝuos feliĉon senfine, kun virtoj de la vojo agordaj kun saĝo, elradikigos naskiĝo-kaj-morton por eterne, liberiĝos de la afliktoj pro avidemo, kolero kaj malvido, kaj akiros liberan vivdaŭron laŭ via volo, ĉu unu joĝano aŭ centoj da joĝanoj aŭ eĉ duiliardoj da joĝanoj. Tiu ĉi lando, farita nature per si mem sen artifiko, kondukas al la vojo al nirvano. Ĉiu el vi bone klopodu por efektiviĝi vian veran volon. Sed ne dubu budhan saĝon, ne interrompu vian klopodon, ne faru pekojn; se vi tiel faras, vi naskiĝas en la palaco el la sep juveloj, kiu troviĝas en la marĝeno de la lando, kaj en kiu vi, detenita en sia hejmo, spertos diversajn malfeliĉojn dum kvincent jaroj.”

¹³ la tri malbonaj sferoj (vd. piednoton 21 de la unua volumo) kun la aliaj du sferoj de dio kaj homo.

¹⁴ La budhana komunumo nomata samgo konsistas el la kvar kategorioj: aro de bikŝuo, de bikŝuino, de upasako (laika kredanto), kaj de upasakino.

Majtrejo diris al la Budho, “Mi prenu vian gravan admonon en mia koro. Mi entuziasme ekzercu min laŭ viaj instruoj, kiujn mi ne aŭdacas dubi.”

[la kvin malbonoj - enkonduko]

La Budho diris al Majtrejo, “Se vi tenas vian koron ekvilibra kaj vian penson ĝusta, kaj faras nenian malbonon en tiu ĉi mondo, tio ĉi vere estas la plej nobla virto. En la dek direktoj de la universo neniu samvaloras kiel vi. Kial? Ĉar en budho-landoj dioj kaj homoj senintence faras bonon, aŭ almenaŭ faras nenian gravan malbonon, do oni povas facile gvidi ilin. Sed mi, fariĝinte budho en tiu ĉi mondo, vivas en la mezo de kvin malbonoj¹⁵, kvin doloroj, kaj kvin bruloj¹⁶. Tio estas eksterordinare malfacila tasko. Sed mi gvidu viv-estaĵojn, por ke ili forĵetu la kvin malbonojn, forlasu la kvin dolorojn, kaj liberiĝu de la kvin bruloj; mi subigu ilian malbonan intencon kaj havigu al ili la kvin bonojn¹⁷, por ke ili tenu meritojn, bone vivtenu en tiu ĉi modo, vivu longe, kaj atingu la vojon al nirvano.”

[la unua malbono]

La Budho diris, “Jen la unua malbono: dioj kaj homoj, kaj eĉ vermoj aŭ tiaspecaj estaĵoj, senescepte deziras fari ĉiajn pekojn. Fortuloj subpremas malfortulojn; la lastaj venĝe mortigas la antaŭajn. Ili vundas kaj mortigas sin reciproke, kiel englutanta serpento aŭ voranta lupoj. Ili ne scias kiel praktiki bonon, faras la plej abomenajn, la plej malmoralajn agojn, pro kio ili poste ricevas punon kaj konsekvence descendas al malbona sfero. Ilia ago estas stampita sur la spirito de la ĉielo kaj tero; ĝi preterlasas neniun pekon. Pro tio troviĝas tiuj, kiuj estas malriĉaj, malnoblaj, almozantaj, solecaj, surdaj, blindaj, mutaj, stultaj, obstinaj, frenezaj, kaj handikapitaj. Sed aliflanke troviĝas tiuj, kiuj estas noblaj, riĉaj, talentaj, kaj kleraj, ĉar ili havis kompatemon kaj amon, praktikis bonajn agojn, kaj akumulis meritojn

¹⁵ peko kontraŭ la kvin preceptoj (ne mortigi, ne ŝteli, ne miskonduti en seksa rilato, ne mensogi, ne preni ebrigiĝilon.

¹⁶ kvin doloroj: rezultoj, kiujn oni suferas en la nuna vivo, de kvin malbonaj agoj
kvin bruloj: rezultoj, kiujn oni suferas en la venonta vivo, de kvin malbonaj agoj

¹⁷ nome, la kvin preceptoj. (vd. piednoton 15)

en sia antaŭa vivo.¹⁸

Kvankam en tiu ĉi mondo troviĝas prizono, kiun leĝo ĉie instalas, viv-estaĵoj en tiu ĉi mondo aŭdacas ignori kaj ne timas ĝin. Ili faras malbonon, krimas, kaj ricevas punon. Espero al liberiĝo el prizono vanas. En tiu ĉi mondo efektive jam troviĝas tia sufero. Sed en la posta vivo sufero estas la plej profunda kaj intensiva. Kiam ili enfalas en malluman mondon, ili renaskiĝas kun alia korpo, puniĝas kaj torturiĝas plej severe.

Tial ili neeviteble trovas sin migranta en la tri malbonaj sferoj, suferante pro sennombraj doloroj kaj afliktoj. Ili ripete ŝanĝas sian korpon, ekhavas novan figuron, prenas alian vivmanieron, kun vivdaŭro foje longa foje mallonga. Ilia animo sekvas konsekvence sian destinton. Kvankam ili solaj renaskiĝas en la sekva mondo, tie ili devas renkonti siajn antaŭajn malamikojn, kaj ili venĝas sin unuj kontraŭ la aliaj senfine. Dum ilia peko ne konsumiĝas, ili ne povas distancigi sin de malamikoj. Tiamaniere ili ripetas naskiĝo-kaj-morton, neniam trovante elirejon, neniam liberiĝante de malbona cirklo. Ilia doloro ne estas esprimebla. Sub la ĉielo, sur la tero, troviĝas tiu ĉi leĝo. Eĉ se bona aŭ malbona ago ne tuj alportas rezulton, certe iam ili devas esti rekompencitaj. Jen tio ĉi estas la unua malbono, la unua doloro, la unua brulo. La sufero atakas ilin, kvazaŭ granda fajro bruligas ilin.

Sed kiuj regas sian koron sen ŝanceliĝo, ĝustigas sian korpon kaj konduton, faras eĉ solaj diversajn bonojn, kaj ne faras diversajn malbonojn en tiu ĉi mondo, tiuj povas liberiĝi el suferoj kaj atingi la virtan vojon transirantan de tiu ĉi mondo al diaj mondoj kaj al nirvano. Jen tio ĉi estas la unua bono.”

[la dua malbono]

La Budho diris, “Jen la dua malbono: homoj en tiu ĉi mondo - gepatroj kaj gefiloj, gefratoj, familianoj, geedzoj - ĉiuj perdis sian moralon kaj ne sekvas leĝan devon. Ili estas ekstravagancaj, lascivaj, kapricaj, diboĉaj, kaj dezirantaj nur plezurigi sian emon. Ili dorlotas sian koron kaj

¹⁸ Tiu ĉi paragrafo ŝajnas esti problema. Estas notinde, ke al la aliaj versioj de tiu ĉi sutro (sanskrita, tibeta, kaj aliaj malnovaj ĉinaj) mankas la priskribo pri la kvin malbonoj. Eble la tradukinto, *Samghavarman*, aldonis tiun ĉi priskribon laŭ sia propra kompreno. Estas ne prave kompreni socian diskriminacion kaj korpan aŭ mensan handikapitecon kiel rezulton de agoj en antaŭa vivo. La ideologio en la tuto, videbla en la paragrafoj pri la kvin malbonoj, devenis ne de hinda aŭ budhisma, sed de ĉina pensmaniero.

Vd. la retejon: <<http://labo.wikidharma.org/index.php>/補註 5 >

trompas unu la aliajn. Ili koro kaj buŝo ne koincidas, tial al ilia parolo mankas vereco. Ili estas flatemaj, komplimentemaj, malsinceraj, ĵaluzaj kontraŭ saĝuloj. Ili kalmunias kaj insidas bonulojn senkulpaĵn.

Ankaŭ reĝoj ne estas kleraj, konfidante gravan postenon al ministroj, kiuj siaflanke faras multajn falsaĵojn. Eĉ kiam iuj bone konas leĝojn kaj mondan situacion, iliaj superuloj ne konvenas al sia posteno, kaj tial tiuj taŭguloj estas perfiditaj kaj perditaj, kio kontraŭstaras la racion de la ĉielo kaj tero. Ministroj trompas reĝojn, gefiloj trompas siajn gepatrojn; gefratoj, geedzoj, parencoj, konatuloj tiel same trompas kaj erarigas unu la aliajn.

Ĉiu el ili tenas en sia sino avidemon, koleron, kaj malvidon. Ili volas ŝajni sin gravuloj kaj havi multon kiom eble. Ĉu noblaj aŭ malnoblaj, ĉu altrangaj aŭ malaltrangaj, ili estas samaj en sia koro. Ili faligas sian familion en bankroton kaj pereigas sin mem. Ĉar ili ne konsiderante estintecon kaj estontecon, iliaj parencoj ankaŭ pereas, envolvite en krizon.

En kelkaj okazoj, parencoj, konatoj, samvilaĝanoj, samregionanoj, stultuloj, sovaĝuloj, ili kune okupiĝas pri malbonaj planoj, kverelas inter si pri divido de profito, koleras, kaj tenas profundan venĝemon en sia sino. Eĉ kiam ili estas riĉaj, ili estas avaraj por donaci ion ajn. Ili avidas trezorojn tiel avide, ke zorgo malsanigas ilian korpon kaj koron. Atingonte la finon de sia vivo, ili tamen havas nenion fidindan. Homoj naskiĝas solaj kaj mortas solaj; neniu sekvas ilin. Sekvas nur ilia karmo, ĉu bonaj aŭ malbonaj, ĉu feliĉaj aŭ malfeliĉaj. Kelkaj renaskiĝas en la bona sfero de homo aŭ de dio, kaj kelkaj en la malbona sfero de narako, de malsatulo, aŭ de besto. Post renaskiĝo, kiom ajn ili pentas, nenio helpas ilin.

Homoj en tiu ĉi mondo estas stultaj kaj malsaĝaj, malamas kaj klaĉas bonulojn sen nenia volo imiti aŭ atingi ilin, kaj nur faras malbonajn agojn kontraŭleĝajn. Ili estas ĉiam pretaj ŝteli alies profitojn; tiel ŝtelitajn aĵojn ili tuj foruzas kaj denove serĉas ŝancon de ŝtelado. Ĉar ilia koro estas plena de maljusteco, ili ĉiam timas, ke aliujoj ekscias ilian intencon. Ili, ne anticipante konsiderante konsekvencon rezulton, pentas sian agon nur post la malkovriĝo.

En la nuna mondo troviĝas karcero instalita de reĝo. Krimuloj devas ricevi punon tie laŭ la grado de sia krimo. Tiel same, se homoj en la antaŭa vivo faras krimon, ne fidante moralon kaj ne farante bonajn agojn, ĉielaj dioj enskribas klare ilian nomon kaj detale iliajn agojn. Kaj poste, kiam ilia vivo finiĝas, ilia animo enfalas en la malbonan sferon de narako, de malsatulo, aŭ de besto, kie ili estas atakataj de senmezureblaj suferoj. Tial pro natura iro ili devas transmigradi sinsekve dum multaj kalpoj sen elirejo,

neniam trovante ŝancon de liberiĝo. Jen tio ĉi estas la dua malbono, la dua doloro, la dua brulo. La sufero atakas ilin, kvazaŭ granda fajro bruligas ilin.

Sed kiuj regas sian koron sen ŝanceliĝo, ĝustigas sian korpon kaj konduton, faras eĉ solaj diversajn bonojn, kaj ne faras diversajn malbonojn en tiu ĉi mondo, tiuj povas liberiĝi el suferoj kaj atingi la virtan vojon transirantan de tiu ĉi mondo al diaj mondoj kaj al nirvano. Jen tio ĉi estas la dua bono.”

[la tria malbono]

La Budho diris, “Jen la tria malbono: homoj en tiu ĉi mondo kunigite loĝas inter la ĉielo kaj la tero, kun la vivdaŭro ne tre longa. Inter ili troviĝas unuflanke saĝuloj, potenculoj, kaj altranguloj; aliflanke malriĉuloj, malaltranguloj, malsuperuloj, kaj stultuloj. Tra ĉiuj tavoloj aŭ statoj troviĝas malbonuloj, kiuj tenas aĉan koron en sia sino.

Ili ĉiam imagas malmoralan voluptaĵon, estas konfuzitaj de diversaj aĉaj pensoj, de amaferoj, kaj de deziroj, kio maltrankviligas ilian vivon, ĉu sidantaj, ĉu starantaj. Ili estas tiel persistemaj kaj avaraj pri objektoj de ilia deziraĉo. Ili amindumas belulinojn, montras obscenan konduton aŭ parolon, kaj rilatas sekrete kun virinoj, dume malŝatante sian propran edzinon. Ili konsumas sian havaĵon por fari kontraŭleĝan krimon.

Kelkaj kunvenas en bando, batalas kontraŭ alia bando, rabas aĵojn minacante aŭ eĉ mortigante aliulojn. Kelkaj ne prenas sian laboron, rimarkas alies havaĵon, ŝtelas ĝin; se tio alportas al ili iom da profito, ili iom post iom havas pli grandan deziron kaj finfine vivtenas sin kaj siajn familianojn per ŝtelado; tamen ilia koro ĉiam estas timema. Ili estas tute arbitraj por plezurigi sian menson kaj korpon. Ili ne scias respekti pliaĝulojn inter siaj parencoj kaj disordigas etiketon, kio embarasas iliajn familianojn kaj parencojn.

Agoj de malbonuloj, kiuj ne timas leĝojn de sia regno, estas rimarkitaj de aliaj homoj kaj nehomaj vivaĵoj, estas prilumitaj de la suno kaj la luno, kaj estas notitaj de dioj. Kaj poste, kiam ilia vivo finiĝas, ilia animo enfalas en la malbonan sferon de narako, de malsatulo, aŭ de besto, kie ili estas atakataj de senmezureblaj suferoj. Tial pro natura iro ili devas transmigradi sinsekve dum multaj kalpoj sen elirejo, neniam trovante ŝancon de liberiĝo. Jen tio ĉi estas la tria malbono, la tria doloro, la tria brulo. La sufero atakas ilin, kvazaŭ granda fajro bruligas ilin.

Sed kiuj regas sian koron sen ŝanceliĝo, ĝustigas sian korpon kaj

konduton, faras eĉ solaj diversajn bonojn, kaj ne faras diversajn malbonojn en tiu ĉi mondo, tiuj povas liberiĝi el suferoj kaj atingi la virtan vojon transirantan de tiu ĉi mondo al diaj mondoj kaj al nirvano. Jen tio ĉi estas la tria bono.”

[la kvara malbono]

La Budho diris, “Jen la kvara malbono: homoj en tiu ĉi mondo ne volas praktiki bonon. Ili unu la aliajn incitas fari diversajn malbonojn, parolas false, sakras, mensogas, kaj ornamas vortojn, tiel ke ili kverelas kaj batalas inter si. Ili malŝatas bonulojn, kaj venkobatas saĝulojn; apude ili ridaĉas pro sia fiago. Ili, al kiuj mankas sincereco, estante arogantaj, malhumilaj, kaj ordonemaj, ne respektas siajn gepatrojn, malestimas pliagulojn kaj siajn gvidantojn, ne fidas siajn amikojn, asertas sian pravecon, fanfaronas, ne aŭskultas alies admonojn, kaj neniam hontas pri si mem. Ili fieras pri sia fortenco kaj postulas de aliaj respekti kaj timi ilin.

Ili ne respektas la ĉielon, la teron, la diojn, la sunon kaj la lunon, kaj intence ne faras bonon. Tial estas malfacile gvidi ilin al bona direkto. Pigre pasas tagoj al ili, kiuj imagas, ke ĉio restus sama kiel nun, kaj ne zorgas pri sia estonteco. Tial ili estas ĉiam arogantaj.

Ĉi tiaj malbonoj estas notitaj de la ĉiela dio. Kvankam ili povas iel tiel gardi sian nunan vivon dum iomete da tempo pro siaj bonetaj agoj en la antaŭa vivo, tamen ili, nun farante malbonajn agojn, perdas etan meriton, kaj bonaj dioj forlasas ilin. Ili fariĝas solaj vakece sen fidindaj amikoj. Kiam ilia vivo elĉerpiĝas, konsekvencaj rezultoj de malbonaj agoj faritaj ĝis tiam amasiĝas en ili kaj sekvas ilin ĝis ilia venonta vivo. La dioj registris ilian nomon kaj agojn. Iliaj pekoj tiras ilin en la malbonajn sferojn, ĉar pekoj kaj iliaj rezultoj neniam malaperas. Finfine ili devas fali en kaldronon de narako, kaj iliaj korpoj kaj koroj frakasiĝas en pecojn. Ili sentas treegan doloron. Se ili nur tiam pentus pri sia pasinteco, estas vane. La leĝo pri kaŭzo kaj rezulto tute ne eraras. Tial pro natura iro ili devas transmigradi sinsekve dum multaj kalpoj sen elirejo, neniam trovante ŝancon de liberiĝo. Jen tio ĉi estas la kvara malbono, la kvara doloro, la kvara brulo. La sufero atakas ilin, kvazaŭ granda fajro bruligus ilin.

Sed kiuj regas sian koron sen ŝanceliĝo, ĝustigas sian korpon kaj konduton, faras eĉ solaj diversajn bonojn, kaj ne faras diversajn malbonojn en tiu ĉi mondo, tiuj povas liberiĝi el suferoj kaj atingi la virtan vojon transirantan de tiu ĉi mondo al diaj mondoj kaj al nirvano. Jen tio ĉi estas la kvara bono.”

[la kvina malbono]

La Budho diris, “Jen la kvina malbono: homoj en tiu ĉi mondo estas tiel maldiligentaj kaj pigraj, ke ili ne emas fari bonajn agojn, disciplini sian konduton, kaj plenumi sian laboron. Tial iliaj familioj kaj parencoj suferas pro malsato kaj malvarmo. Se iliaj gepatroj admonas ilin, ili montras kolerajn okulojn kaj redonas sovaĝan replikon. Tia sinteno kaj parolmaniero estas kvazaŭ kontraŭ malamiko. Pro tio iliaj gepatroj pentas, ke ili havas tiajn idojn.

Okaze de donaco aŭ ricevo de aĵoj, al ili mankas modereco, dankemo kaj rekompencemo, kio embarasas aliaj homojn. Kiel rezulto, ili pli kaj pli enfalas en mizeran staton, jam ne havante ŝancon regajni sian havaĵon. Ilia intereso direktas sin sole al ilia propra profito, kiun ili grandigas eĉ per rabo sed foruzas laŭ sia kaprico. Tio fariĝas ilia ĉiutagaĵo, en kiu ili amuzas sin per luksaĵo, frandaĵo kaj drinkaĵo sen limo. Ilia diboĉado jam ne povas esti regata. Ili ne hontas pri sia stulteco, fojfoje kolizias kun aliuloj, ne pripensas alies koron, volas regi aliulojn, kaj malamas bonulojn. Ili ne scias justecon, nek ĝentilecon, nek introspekton. Spite de tio ĉi ili opinias, ke ili estas ĝustaj. Tial neniu povas admoni ilin. Ili ne konsideras financan staton de siaj parencoj, nek dankas siajn gepatrojn, nek pensas pri fideleco al siaj amikoj kaj gvidantoj. En ilia koro ĉiam nestas malbonaĵoj, el ilia buŝo ĉiam venas malbonaj vortoj, kaj de ilia korpo ĉiam estas praktikataj malbonaĵoj, sen eĉ peceto de bonaĵoj.

Ili ne fidis instruojn de sanktuloj en malnova tempo kaj de budhoj, nek fidis la eblecon transiri de tiu ĉi mondo per ekzercado, nek fidis renaskiĝon post morto, nek fidis, ke bona ago alportas bonan rezulton kaj malbona ago malbonan rezulton. Ili mortigas sanktulojn, deziras detruigi samgan harmonion, kaj eĉ deziras vundi siajn gepatrojn, gefratojn kaj parencojn. Pro tio iliaj parencoj malŝatas ilin kaj deziras, ke ili mortu.

Tiaj homoj estas esence samaj je la koro kaj la konscio. Spite sian stultecon kaj malklarecon, ili false kredas, ke ili estas saĝaj, sed ili ne scias, de kie ili venis naskite en tiu ĉi mondo, kaj kien ili iros postmorte. Al ili mankas kompato kaj fleksebleco. Tiel ili, deflankiĝinte de la ĝusta vojo, tamen deziras feliĉon neakireblan kaj longan vivdaŭron. Sed finfine ili devas morti. Sanktuloj kun kompata koro admonas ilin, por ke ĉe ilia koro naskiĝu ĝermo de bona koro kaj ili eksciigu la leĝon pri kaŭzo kaj rezulto, pri naskiĝo kaj morto, kaj pri bono kaj malbono. Sed ili ne kredas ĝin. Kiom ajn sanktuloj strebas persvadi ilin kun multege da vortoj, tio ne helpas, ĉar

ili fermas sian koron kaj ne volas kompreni la admonon. Kaj ĵus kiam ilia vivo estas finiĝonta, timo kaj pento alterne okazas al ili. Ilia timo kaj pento en la fina etapo vanas, ĉar ili ne anticipu praktikis bonon. Jam estas tro malfrue.

En tiu ĉi mondo la leĝo pri la transmigrado inter la kvin sferoj¹⁹ estas klara, vasta kaj profunda. Feliĉo rekompencas virtulojn kaj malfeliĉo malvirtulojn. Ĉiuj ricevas la rezulton de siaj agoj; neniu povas anstataŭi alian. La leĝo pri kaŭzo kaj rezulto estas konsekvenca; kulpoj kaj pekoj sekvas la farantojn ne nur en tiu ĉi vivo sed ankaŭ en la posta vivo. Bonuloj pro sia bona ago migras de feliĉo al feliĉo, de lumo al lumo. Malbonuloj pro sia malbona ago migras de doloro al doloro, de mallumo al mallumo. Kiu scias la profundecon de tiu ĉi leĝo? Budho sola scias ĝin. Kvankam mi instruas ĝin per vortoj, nur malmultaj kredas min. Tial multaj viv-estaĵoj daŭrigas naskiĝo-kaj-morton, neniam povante forlasas la mondon de iluzio. Ne eblas detale klarigi la aferon. Tial pro natura sekvo ili devas transmigradi sinsekve dum multaj kalpoj sen elirejo, neniam trovante ŝancon de liberiĝo. Jen tio ĉi estas la kvina malbono, la kvina doloro, la kvina brulo. La sufero atakas ilin, kvazaŭ granda fajro bruligas ilin.

Sed kiuj regas sian koron sen ŝanceliĝo, ĝustigas sian korpon kaj konduton, koncentras sian penson, akordigas sian parolon kaj agon, faras ĉion ajn sincere kaj adekvate, parolas tion kio estas en la koro, faras eĉ solaj diversajn bonojn, kaj ne faras diversajn malbonojn en tiu ĉi mondo, tiuj povas liberiĝi el suferoj kaj atingi la virtan vojon transirantan de tiu ĉi mondo al diaj mondoj kaj al nirvano. Jen tio ĉi estas la kvina bono.”

[kompato de budho]

La Budho diris al Majtrejo, “La kvin malbonoj kaj suferoj estas ĉi tiel, kiel mi jam diris al vi. La kvin doloroj aŭ la kvin bruloj sinsekve estiĝas. Se oni faras malbonojn, konsekvence oni senescepte enfalas en malbonan sferon. Kelkaj suferas pro malsano malfacile kuracebla kaj tamen ne povas morti, eĉ se ili volas morti [por solvi sian suferon], nek povas [sane] vivi, eĉ se ili volas vivi. Tiel homoj en tiu ĉi mondo ricevas rekompencan de faritaj pekoj. Post la morto ili enfalas en [unu el] la tri malbonaj sferoj laŭ sia antaŭa konduto kaj tie suferas ekstreme, senlime kaj bruliĝante.

Post longa tempo ili povas renaskiĝi en la homa sfero, kie ili denove malamas unu la aliajn. Ilia malbono, kvankam en la komenco ĝi estas

¹⁹ vd. la piednoton 13

ankoraŭ malgranda, iom post iom kreskas al granda malbono. Ĉar ili persistas en sia posedaĵo kaj amorado, ili ne faras donacon. Ilia stulta deziraĉo pelas ilin al egoisma pensmaniero. Ilia kleŝo katenas ilin, neniam malligiĝante. Ilia intereso ĉiam direktiĝas al ilia propra profito, tial ili batalas unu kontraŭ la aliaj, neniam repripensante. Hazarde povas esti, ke ili fariĝas riĉaj aŭ prosperaj, sed ĉar ili dronas en plezuro kaj ne kapablas pacienci, ilia riĉeco aŭ prospero daŭras nur mallonge kaj baldaŭ malaperas. Iliaj sufero kaj doloro fariĝas pli grandaj en pli posta tempo.

La leĝo pri kaŭzo kaj rezulto similas al reto etendita inter la ĉielo kaj la tero, ĉar ĝi neniun lasas forkuri, kalkulante ĉiujn pekojn senescepte. Pekuloj timas kun maltrankvila koro, havante neniun konfidindan kaj estante solecaj. Tio estas senŝanĝa kaj pasintece kaj nuntempe. Vere kompatinde, vere plorinde.”

La Budho diris al Majtrejo, “Homoj en tiu ĉi mondo estas ĉi tiaj. Tial ĉiuj budhoj kompatas ilin kaj per sia majesta forto frakasas diversajn malbonojn, por ke ili direktiĝu al bono. Se ili forĵetas erarajn pensojn, tenas admonojn de budhoj, kaj praktikas laŭ la instruoj, ne rezignante aŭ flankenirante survoje, ili finfine povas forlasi tiun ĉi suferoplenan mondon kaj gajni nirvanon.”

La Budho diris, “Ne nur vi, Majtrejo, sed ankaŭ ĉiuj homoj kaj dioj en la nuna kaj posta mondoj devas aŭskulti budhan instruon, bone konsideri ĝian signifon, kaj ĝustigi sian koron kaj konduton en la nuna tempo. Superuloj devas fari bonojn por gvidi kaj edifi subulojn tiel, ke ilia maniero sinsekve transiru al subuloj, kaj ke ĉiuj protektu sin mem de malbonaĵoj, respektu sanktulojn, estimu bonulojn, amu vaste estaĵojn kun kompatato kaj filantropio, kaj ne malobservu admonojn de budho. Vi ĉiuj serĉu la vojon transcendi tiun ĉi mondon kaj fortranĉu la radikon de naskiĝo-kaj-morto kaj de diversaj malbonoj. Vi forlasu la suferoplenajn tri malbonajn sferojn.

Vi ĉi tie akumulu vaste meritojn, disvastigu viajn favorojn, faru donacojn, kaj ne peku kontraŭ preceptojn de budho. Kun pacienco, strebado, koncentrado kaj saĝo instruu aliajn estaĵojn, faru moralajn agojn, starigu bonojn. Ĝustigu vian koron kaj volon, tenu preceptojn kaj estu puraj almenaŭ unu tagon kaj unu nokton. Tiam via merito estas pli granda ol tiu, kiun vi akumulus en la lando de nemezurebla vivo dum cent jaroj. Kial? Ĉar en tiu budha lando, kiu estas farita nature per si mem sen artifiko, ĉiuj loĝantoj akumulas bonojn, kaj ne troviĝas eĉ unu haro da malbonoj. Sed, ĉar en tiu ĉi mondo estas plena de malbonaĵoj, se vi ĉi tie praktikas bonojn dum dek tagoj kaj dek noktoj, via merito estas pli granda

ol tiu, kiun vi akumulus en aliaj budhaj landoj dum mil jaroj. Kial? Ĉar en aliaj budhaj landoj multaj faras bonojn kaj malmultaj faras malbonojn. Tieaj loĝantoj sen strebado povas akiri meritojn kaj virtojn, malhavante lokon por fari malbonojn. Sed nur tiu ĉi mondo estas plena de malbonaĵoj, tial ĉi tie natura akiro de meritoj estas neebla. Ĉi tie estaĵoj ŝvitas pro siaj deziroj, trompas unu la aliajn, estas lacaj mense kaj korpe, kvazaŭ ili prenas maldolĉaĵojn kaj venenaĵojn, kaj estas urĝataj de bagateloj, neniam ripozante.

Mi vere kompatas vin, ĉielajn kaj homajn estaĵojn, kaj penas ĝentile instrui vin, por ke vi povu akumuli meritojn. Ĉar mi gvidas vin laŭ via kapablo, vi ne povas ne kompreni la instruojn, kiujn mi donas al vi. Ĉiuj povas atingi la vojon responde al via antaŭa volo.

En lando, urbo aŭ vilaĝo, kie budho paŝas, neniu ne akceptas lian gvidon. Tie oni pace vivas, la suno kaj la luno klare brilas, vento kaj pluvo estas moderaj, kataklismo kaj epidemio ne okazas. Tia lando estas riĉa, tieaj loĝantoj estas trankvilaj sen batali kun armiloj. Tie homoj respektas virtojn, havas afablan koron, kaj praktikas ĝentilecon kaj humilecon.”

La Budho diris, “Mi kompatas vin, ĉielajn kaj homajn estaĵojn, multe pli ol gepatroj amas siajn gefilojn. Tial mi ĝuste en tiu ĉi mondo fariĝis budho por venki la kvin malbonojn, forviŝi la kvin dolorojn, pereigi la kvin brulojn, ataki malbonojn per bonoj. Mi elradikigu la suferojn de naskiĝo-kaj-morto, por ke vi povu akiri la kvin virtojn²⁰, kaj igu vin supreniri al la trankvilo de nirvano.

Sed post kiam mi forpasos, la budha instruo iom post iom malprosperos, homoj denove faros diversajn malbonojn, kaj la kvin doloroj kaj la kvin bruloj revenos kiel malantaŭe, eĉ pli severaj. Ne eblas detale priparoli la suferojn. Mi nur koncize klarigis por vi.”

La Budho diris al Majtrejo, “Ĉiu el vi bone pripensu ĉi tion. Gvidu kaj admonu unu la aliajn reciproke helpante. Sekvu budhan instruon, neniam kontraŭu ĝin.”

Nun la bodisatvo Majtrejo kun polmoj metitaj respekte diris, “Via admono estas vere severa. Homoj en tiu ĉi mondo estas ĝuste tiel, kiel vi klarigis. Sed tatagato afablas universale ami kaj kompati tiujn ĉi homojn kaj liberigas ilin senescepte. Ni ne kontraŭu vian ĝentilan admonon.”

²⁰ virtoj akireblaj per observado de la kvin preceptoj: ne mortigi, ne ŝteli, ne adulti, ne mensogi, kaj ne drinki.

[sceno de la pura lando]

La Budho diris al Ananda, “Vi stariĝu kaj rearanĝu vian robon. Kunmetu viajn polmojn respektive kaj riverencu la Budhon de Nemezurebla Vivo. Budhoj en la dek direktoj de la universo ĉiam kune laŭdas tiun Budhon, kiu ne estas alligita nek barita.”

Ananda tuj stariĝis, rearanĝis sian robon, rektigis sian pozon, direktis sian vizaĝon fronte al la okcidento, kunmetis siajn polmojn respektive, metis siajn kvin korpopartojn²¹ sur teron, riverencis la Budhon de Nemezurebla Vivo, kaj diris, “Bagavato, mi volas vidi tiun Budhon, ties landon de feliĉego, kaj la kolektiĝon de tieaj bodisatvoj kaj disĉiploj.”

Kiam li tiel ĉi eldiris, la Budho de Nemezurebla Vivo tuj eligis grandan lumon, kiu atingis la landojn de ĉiuj budhoj. La montoj *Ĉakravada* kaj *Sumeru* kaj aliaj ĉiuj montoj, ĉu grandaj aŭ malgrandaj, fariĝis same orkoloraj. Kiel en la fino de la mondo oni vidas nur akvon, en kiun ĉiuj objektoj estas subigitaj de inundo, tiel same la lumo de la Budho sola brile plenigas la mondon, kaj tiu de disĉiploj kaj bodisatvoj estas kovrita de ĝi.

Tiam Ananda vidis, ke la Budho de Nemezurebla Vivo estas majeste brilanta, same kiel la monto *Sumeru*, kies alteco superas ĉiujn aliajn montojn. Ĝia figuro brilis kun klara lumo. Ĉiuj anoj de la kvar kategorioj de la samgo, bikŝuoj kaj bikŝuinoj, laikoj kaj laikinoj, vidis la scenon en la sama momento. Ankaŭ anoj de la aliaj mondoj vidis la saman scenon.

Tiam la Budho diris al Ananda kaj la bodisatvo Majtrejo, “Ĉu vi vidis, ke en la lando, de la tero ĝis la ĉielo de pura rezidejo, ĉiuj aĵoj estas vere delikataj kaj puraj?” Ananda respondis, “Jes, mi jam vidis tion.” “Ĉu vi do aŭskultis la Budhon de Nemezurebla Vivo prediki kun granda voĉo al vivestaĵoj en ĉiuj mondoj?” Ananda respondis, “Jes, mi jam aŭskultis.” “Ĉu vi jam vidis homojn en tiu lando de la Budho senbare viziti ĉiudirekten por fari oferon al budhoj, mem loĝante en granda palaco el la sep juveloj kaj kun la grandeco de centoj aŭ miloj da joĝanoj?” “Mi jam vidis.” “Ĉu vi vidis, ke en tiu lando troviĝas estaĵoj naskitaj el utero?” “Jes, mi jam vidis.” “La palaco de estaĵoj naskitaj el utero havas la grandecon de cent joĝanoj, aŭ de kvincent joĝanoj. Ĉiuj, loĝante tie, vivas kun diversaj plezuroj, same kiel en la dua ĉielo *Trajastrimŝa*²². Tio estas tute konsekvenca.”

²¹ Ekde la antikva Hindio la plej alta respekto estas montrita per tutkorpa riverenco: meti ambaŭ manplatojn, ambaŭ genuojn, kaj frunton. Budhismo alprenis tiun ĉi manieron.

²² vd. la piednoton 38 de la unua volumo.

[du specoj de naskiĝo]

Tiam la bodisatvo Majtrejo diris al la Budho, “Bagavato, pro kiaj kaŭzoj kaj kondiĉoj troviĝas la diferenco inter estaĵoj naskitaj el utero kaj tiuj memnaskitaj [pro siaj agoj] en tiu lando?”

La Budho diris, “Supozu, ke iuj viv-estaĵoj deziras naskiĝi en tiu lando, praktikante diversajn meritojn, ĉar ili ne fidas [la povon de Amitabo]. Ili ne scias la budhan saĝon, neimageblan saĝon, neesprimeblan saĝon, mahajanan vastan saĝon, senegalan, senrivalan kaj la plej superan saĝon; ili dubas pri tiu ĉi saĝo, sed kredas sian propran kapablon, kiu alportas feliĉon aŭ malfeliĉon. Ili depende de siaj bonaj praktikoj deziras naskiĝi en tiu lando. Tiukaze tiaj viv-estaĵoj naskiĝas en palaco de la lando kaj restas tie dum kvincent jaroj, sed dume neniam vidas la Budhon, nek aŭskultas lian instruon, nek vidas tieajn bodisatvojn kaj disĉiplojn. Tiaj estas viv-estaĵoj naskitaj el utero.

Aliflanke, troviĝas alitipaj viv-estaĵoj; ili fidas budhan superan saĝon kaj praktikas diversajn meritojn. Rezulte de tio ili estas memnaskitaj konsekvence, kaj sidas medite kun siaj kruroj kruciĝantaj sur la floroj faritaj el la sep juveloj. Kaj ili tuj plenigas senmanke sian figuron per fizikaj karakterizaĵoj, lumoj, saĝoj, meritoj kaj aliaj aspektoj propraj al bodisatvo.

Vi, Majtrejo, supozu ĉi tion: diversaj grandaj bodisatvoj en aliaj landoj, vidinte la Budhon de Nemezurebla Vivo, ekdeziras fari omaĝon kaj oferon al la Budho kaj diversaj bodisatvoj kaj disĉiploj en tiu lando. Tiuj ekdezirintaj bodisatvoj post la fino de la vivo povas memnaskiĝi en la lando de la Budho sur la floroj el la sep juveloj. Sciu, Majtrejo, ke estaĵoj memnaskitaj posedas eminentan saĝon, dum al estaĵoj naskitaj el utero mankas saĝo. Dum kvincent jaroj ili tute ne vidas la Budhon, nek aŭdas budhan instruon, nek vidas budhajn disĉiplojn, do al ili mankas ŝancoj por fari omaĝon kaj oferon al la Budho. Ili ne konas manieron de praktikoj farendaj por bodisatvo, kaj ne povas akumuli meritojn. Sciu: tiel ĉi devas esti, ĉar ili en sia antaŭa vivo, ne havante saĝon, enfalis en dubon.”

La Budho diris al Majtrejo, “Mi klarigu tion ĉi per unu parabolo; sankta reĝo *Ĉakravarti*²³ havas, krom sia propra palaco, apartan palacon el la sep juveloj, kiu estas per diversaj manieroj ornamitaj, kaj en kiu litoj kun kurtenoj estas instalitaj kaj silkaj flagoj estas pendigitaj. Kiam iuj reĝidoj faras pekon kontraŭ la reĝo, li katenas ilin per ora ĉeno en la palaco kaj provizas ilin per manĝaĵoj, trinkaĵoj, vestaĵoj, litoj, kovriloj, floroj, parfumoj,

²³ vd. la piednoton 45 de la unua volumo.

muzikoj kaj aliaj plezuraĵoj, same kiel sin mem; nenia materialo mankas al ili. Nun mi demandu: ĉu ili volas resti tie?”

Majtrejo respondis, “Certe ne. Ili deziras nepre eliri de tie per ĉiaj eblaj rimedoj, aŭ eĉ petante helpon de aliaj fortuloj.”

La Budho diris al Majtrejo, “Tiuj ĉi estaĵoj [naskitaj el utero] estas tiel samaj. Ĉar ili ne fidis budhan saĝon, ili devas naskiĝi en la palaco de utero, ne punite, nek suferante pro malbonaĵoj dum eĉ unu momento. Sed ili ne povas vidi la tri juvelojn, nek praktiki bonojn farante omaĝon kaj oferon al budhoj dum kvincent jaroj. Tio ĉi estas ja sufero. Malgraŭ aliaj diversaj plezuroj, ili ne deziras resti tie.

Sed se ili ekkonas sian pekon kaj profunde memkritikas, dezirante forlasi tiun lokon, ili povas laŭ sia intenco viziti la Budhon de Nemezurebla Vivo kun sia respekto kaj oferaĵo, same kiel diversajn sennombrajn budhojn, sub kiuj ili povas akumuli siajn meritojn.

Sciu, Majtrejo, eĉ bodisatvoj, se ili dubas pri budha saĝo, perdas grandan profiton. Tial vi ĉiuj devas fidi senegalan saĝon de la Budho de Nemezurebla Vivo.”

[bodisatvoj naskiĝontaj en la pura lando]

Majtrejo demandis la Budhon “Bagavato, kiom da bodisatvoj, kiuj atingis la etapon de ne-regreso²⁴, de tiu ĉi mondo naskiĝos en tiun budho-landon?”

La Budho respondis al Majtrejo, “De tiu ĉi mondo ses miliardoj kaj sepcent milionoj da bodisatvoj, kiuj atingis la etapon de ne-regreso, naskiĝos en tiu lando. Tiuj bodisatvoj jam praktikis omaĝon kaj oferon al sennombraj budhoj, same kiel vi, Majtrejo. Cetere ankaŭ troviĝas sennombraj bodisatvoj, kies praktikado ne estas sufiĉa, kaj kies merito estas ankoraŭ malgranda; sed ankaŭ ili ĉiuj naskiĝos en tiu lando.”

La Budho diris al Majtrejo, “Ne nur bodisatvoj el mia lando, sed ankaŭ tiuj el aliaj budho-landoj naskiĝos en tiu budho-lando [de Amitabo].

Inter tiuj budhoj, la unua estas nomata Budho Foren-Brilanta, de kies lando dek ok miliardoj da bodisatvoj naskiĝos [en la pura lando]. La dua estas nomata Budho Trezoro-Tenejo, de kies lando naŭ miliardoj da bodisatvoj naskiĝos. La tria estas nomata Budho Nemezurebla-Sono, de kies lando dudek du miliardoj da bodisatvoj naskiĝos. La kvara estas nomata Budho Dolĉa-Rosoo, de kies lando dudek kvin miliardoj da

²⁴ vd. la piednoton 26 de la unua volumo.

bodisatvoj naskiĝos. La kvina estas nomata Budho Drako-Venko, de kies lando dek kvar miliardoj da bodisatvoj naskiĝos. La sesa estas nomata Budho Venko-Foro, de kies lando dek kvar mil bodisatvoj naskiĝos. La sepa estas nomata Budho Leono, de kies lando dek kvindek miliardoj da bodisatvoj naskiĝos. La oka estas nomata Budho For-Malpuraĵo, de kies lando ok miliardoj da bodisatvoj naskiĝos. La naŭa estas nomata Budho Virto-Ĉefo, de kies lando ses miliardoj da bodisatvoj naskiĝos. La deka estas nomata Budho Fajna-Virto-Monto, de kies lando ses miliardoj da bodisatvoj naskiĝos. La dek-unua estas nomata Budho Homo-Reĝo, de kies lando unu miliardo da bodisatvoj naskiĝos. La dek-dua estas nomata Budho Sensupera-Floro, en kies lando troviĝas sennombraj nekalkuleblaj bodisatvoj; ili ĉiuj atingis la etapon de ne-regreso, kaj ilia saĝo estas superba; ili jam finfaris omaĝon kaj oferon al sennombraj budhoj kaj finekzercis multege da tiaj praktikoj dum nur sep tagoj, por kiuj ordinaraj bodisatvoj bezonas milionojn aŭ miliardojn da kalpoj; ili ĉiuj naskiĝos. La dek-tria estas nomata Budho Sen-Timo, en kies lando troviĝas sepdek naŭ milidardoj da superaj bodisatvoj, kaj krome sennombraj malsuperaj bodisatvoj kaj bikŝuoj; ili ĉiuj naskiĝos.”

La Budho diris al Majtrejo, “Naskiĝas ne nur bodisatvoj el tiuj ĉi dek kvar budho-landoj, sed ankaŭ sennombraj bodisatvoj el ĉiuj sennombraj budho-landoj en la dek direktoj de la universo. Se mi tage kaj nokte citadas la nomojn de la budhoj en la dek direktoj kaj kalkuladas la nombron de naskiĝontaj bodisatvoj kaj bikŝuoj, ne sufiĉas eĉ unu kalpo. Mi ĵus nur tre koncize klarigis tion ĉi por vi.”

[konkludo: konfidi la sutron]

La Budho diris al Majtrejo, “Sciu, ke ĉiu ajn, kiu aŭdas la nomon de tiu Budho kaj sentas ĝojegon, eĉ se tio estas nur momenta, kaptos grandan profiton, nome havigos al si sensuperan meriton. Tial, Majtrejo, eĉ se fajrego plenigas tiun ĉi universon el miliardoj da mondoj, oni devas trapasi ilin por aŭskulti tiun ĉi sutron kun ĝoja konfido, teni kaj recitadi ĝin, kaj ekzerci sin laŭ ĝi. Kial? Ĉar troviĝas multaj bodisatvoj, kiuj ne povas aŭskulti tiun ĉi sutron malgraŭ sia entuziasma volo. Inter multege da viv-estaĵoj, se iu povas aŭskulti tiun ĉi sutron, tiu neniel regresas de la vojo kondukanta al la plej supera vervekiĝo. Tial vi devas koncentri vian atenton por akcepti, kompreni, teni, reciti, prediki kaj praktiki la sutron.

La Budho diris, “Nun mi liveris tiun ĉi sutro por la bono de ĉiuj viv-estaĵoj kaj ebligis al ili vidi la Budhon de Nemezurebla Vivo kaj ĉiujn

apartenajojn de ties budho-lando. Se al vi restas duboj aŭ neklaraj punktoj, demandu min pri ili. Ne estiĝu duboj post mia nirvano. Estonte la vojo al vervekiĝo perdiĝos, sed mi kun granda kompato speciale aranĝas, ke tiu ĉi sutro restu ankoraŭ cent jarojn post la perdiĝo. Ĉiu, kiu renkontas tiun ĉi sutron, povu nepre atingi la vojon laŭ sia volo.”

La Budho diris al Majtrejo, “Estas malfacile renkonti la aperon de tatagato en tiu ĉi mondo; estas malfacile vidi tatagaton; estas malfacile renkonti kaj aŭdi instruon de diversaj budhoj; ankaŭ estas malfacile aŭdi superban darmon kaj perfektajn virtojn de bodisatvoj; ankaŭ estas malfacile renkonti bonan gvidanton, aŭdi de li darmon, kaj praktiki ĝin. Sed la plej malfacile inter diversaj malfacilaĵoj estas aŭdi tiun ĉi sutron kaj teni ĝojon kaj konfidon. Ĝuste tial mia darmono estu ĉi tiel, kaj efektive mi eksplikis ĉi tiel kaj instruis ĉi tiel. Vi devas sekvi la darmon por praktiki tiel, kiel instruate.

[konkludo: efiko sur la aŭdantaro]

Kiam la Budho liveris tiun ĉi predikon, ĉiuj sennombraj viv-estaĵoj decidis serĉi la vojon al la plej supera vervekiĝo. Dek du dekiliardoj da homoj ekposedis puran okulon de darmono, du miliardoj kaj dumil miloj da dioj kaj homoj atingis la stadion de ne-reveno²⁵, okcent mil bikĉuoj neniiginte ĉiajn kleĉojn plene liberiĝis, kaj kvar miliardoj da bodisatvoj atingis la etapon de ne-regreso. Ili ornamis sin per la virtoj de grandaj votoj, kiuj certe kondukos ilin al vervekiĝo en estonto. Tiam la universo el miliardoj da mondoj skuiĝis diversmaniere. Granda lumo lumigis ĉiujn mondojn en la dek direktoj. Centoj aŭ miloj da tonoj de muziko sonis spontane. Sennombraj superbaj floroj falis de la ĉielo.

Kiam la Budho finis prediki tiun ĉi sutron, Majtrejo, aliaj bodisatvoj venintaj el la dek direktoj, veterana disĉiplo Anando, aliaj gravaj disĉiploj, kaj ĉiuj aliaj, kiuj kolektiĝis tien ĉi, aŭskultinte la predikon de la Budho, ĝojis senescepte.

(fino de la dua volumo)

²⁵ sanskrite *anāgāmi*. Laŭ frutempa aŭ teravada budhismo, troviĝas la kvar stadioj de bodisatvoj por atingi la finan vervekiĝon: (1)*sotāpanna*, (2)*sakadāgāmi*, (3)*anāgāmi*, (4)*arahant*. Ĉe la tria stadio, *anāgāmi*, oni jam ne renaskiĝas kiel homo - ne revenas al homa mondo -, kaj supreniras al dia mondo, de kie oni celas al la fina stadio.